

Fino de la Castro-erao – sed ĝia spirito ankoraŭ ne mortis – eĉ pli malcerta estonto sekvos por la kubanoj

Politika-sociologia analizo post la abdiko de Raúl Castro kiel prezidento de Kubo

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli



(Fidel Castro, Raúl Castro kaj Miguel Díaz-Canel, fotoj el Vikipedio)

Kiel kutime en la politika vivo de Kubo, la rezulto de la parlamenta elekto de marto 2018 estis konata jam anticipe: la elektojn gajnis la Komunisma Partio de Kubo, ĉar aliaj partioj ne ekzistis kaj ne estis permesataj. Por ĉiu deputito estis ekzakte po unu kandidato je la dispono, kaj nur tiujn kandidatojn la kubaj elektantoj povis „elekti“. La kvoto de la partopreno estis 79 procentoj.

Kaj tamen la evento promesis interesan novaĵon: La lando ricevos en aprilo novan ŝtatprezidenton, ĉar Raúl Castro retiriĝos de ĉi tiu ofico. Plej verŝajne lia posteulo nomiĝos Miguel Díaz-Canel.

Kaj tiel fariĝis, la 20an de aprilo 2018, ĉar la 19an finiĝis la regado de Castro, la nova prezidento kun la nomo Miguel Díaz-Canel estis proklamita. Sed jam la unua oficiala parolado de la nova ŝtatestro, kiu en Kubo estas apenaŭ konata persono, postlasis malbonan impreson. Antaŭ la 605 parlamentanoj li aspektis nerveze, laŭlegis sian tekston de la folio kaj ne kapablis flue paroli. Eĉ pli ol lia malcerteco seniluziigis la aŭskultantojn la enhavo de lia parolado, almenaŭ tiujn, kiuj ne apartenas al la kerno (aŭ elito) de la kuba KP kaj ne ŝatas ĝian politikan ĵargonon. Tiuj homoj ne kredis siajn orelojn, kiam la posteulo de Raúl Castro diris: „Raúl Castro plue prenos la ĉefajn decidojn.“ Krome li promesis, ke li „certigos la kontinuecon de la kuba revolucio en historia momento.“ Al tiuj, kiuj esperis pli da reformoj, li klarigis, ke „en Kubo ne estas loko por tiuj, kiuj atendas la revenon de la kapitalismo.“ Kaj tio ne estis ĉio, sed li diris ankaŭ, ke „antaŭ ni staras ideologia defio, kiu konsistas en la lukto kontraŭ la hegemonio de pseŭdokulturaj valoroj, kiujn oni klopodas trudi al ni.“

Ĉio klaras. La politika tarifo por la nova erao estis klare kaj nemiskrompreneble komunikita. La posteulo de Castro Ĥa komprenigis al la kuba publiko kaj al la ekstera mondo, ke li estas nura marioneto de Castro kaj lakeo de la malnova sistemo. Ŝajnas, ke li ne komprenis la bezonojn de la nova erao kaj la dezirojn de la kubanoj.

Ĉu Kubo do nun estas definitive perdita? Sub tiaj premisoj verŝajne jes, des pli ke Usono denove montras la malvarman ŝultron al la insulo, kiu estos punita pro siaj amrilatoj kun Obama, kiu volis helpi plibonigi la internacian situacion de la lando. Sub Raúl Castro estis heziteme enkondukitaj malrapidaj reformoj, kiuj ebligis pli grandan liberecon por privataj entreprenoj. Sed la degela vetero ŝajne jam finiĝis.

Kiu estas la nova prezidento?

Kiel dirite, neniuj homoj sur la insulo vere konas la novan prezidenton Miguel Díaz-Canel, kvankam li estis preparata de la partio por sia nova tasko jam de jaroj. Li estas 58-jara kaj do naskiĝis post la kuba revolucio de 1959. Longan tempon li estis partia funkciulo en sia hejma provinco Villa Clara en la centro de Kubo kaj poste en la oriento de la insulo, en Holguín. Do, li ĉiam troviĝis for de la politika centro Havano, kie ĉiuj decidoj pri Kubo estas faritaj. Laŭ profesia klerigo Díaz-Canel estas elektroinĝeniero, ĉefleŭtenanto de la kuba armeo, edzo por la dua fojo kaj patro de du infanoj el la unua geedziĝo. Eĉ por kubaj fakuloj Díaz-Canel estas nekonata nomo. Homoj, kiuj konas lin el lia tempo kiel junulara funkciulo, karakterizis lin inteligenta kaj modesta persono kun kaj liberalisma spirito. Anstataŭ aparteni al la generacio de la kastrismaj revoluciuloj, li reprezentas la generacion de rokmuzikistoj kiel Beatles, kiuj portis longajn harojn kiel li. Nature, hodiaŭ li portas sian hararon mallonge kaj grize. Sed malgraŭ tiuj ŝajnaj plusoj, kiuj devus fari lin alloga kaj akceptebla por la junaj generacioj, Díaz-Canel disponas eĉ pri malpli da karismo ol Raúl, kiu eterne staris apud aŭ malantaŭ Fidel kiel ties malgranda frato, pri kiu la kubanoj ŝatis ridi kaj moki.

En 2003 Díaz-Canel avancis kiel plej juna membro de la politburoo, en 2009 li fariĝis ministro pri pli alta klerigo. En 2013 Díaz-Canel fariĝis la unua anstataŭanto de Raúl, sed en tiu pozicio Díaz-Canel neniam elpaŝis kiel reformisto. Ĝis nun Díaz-Canel rigide reprezentis la politikon de Raúl Castro, kiu permesis prudentajn ekonomiajn reformojn, sed rezignis pri politikaj eksperimentoj.

Ĉu Díaz-Canel do estas senespera kazo aŭ ĉu li povos, malgraŭ sia kariero kiel griza teknokrato, konduki Kubon el la mizero kaj al nova hela estonteco, post la morto de Raúl, en kies ombro li ankoraŭ staras? Neniuj povas doni respondon al ĉi tiu demando.

Nu, Raúl Castro tamen ne komplete retiriĝos, sed li restos dume konservata al la pinta kuba politiko. Ĝis 2021, kiam li fariĝos 90-jara, li intencas konservi la oficon de la unua sekretario de la Komunisma Partio de Kubo, kiu probable estas la plej grava kaj influa politika posteno en Kubo. Krom tio li estis reelektita kiel simpla deputito de la nacia parlamento por reprezenti la distrikton Santiago de Cuba. Sub tiaj premisoj gravaj ŝanĝoj en Kubo estos neimageblaj, kaj tion ja publike konfirmis kaj ĵuris la nova prezidento Miguel Díaz-Canel mem.

Atentinda estas cetere la cirkonstanco, ke neniuj el la popularaj „kronprincoj“ ricevis la politikan torĉon: nek iu el la legendea familio de Castro, inter kelkaj troviĝas iuj skandalaj kazoj, nek unu el la malnovaj partiaj kamaradoj, kiuj eble revis pri granda kariero fine de sia vivo. Sed pro tro alta aĝo la „historiaj komandantoj“ (kiel José Ramón Machado Ventura, Ramiro Valdés Menéndez, Guillermo García Frías) ne plu estis konsidereblaj kiel posteuloj de Castro. Ankaŭ Bruno Rodríguez, internacie estimata ministro pri eksteraj aferoj, ĉar brila intelektulo, devis forgesi siajn ambiciojn.

Malbona ekonomio

La ekonomiaj indikoj de Kubo montras malsupren. Sendependaj ekonomiistoj supozas, ke la enlanda malneta produkto de Kubo ŝrumpis en la du pasintaj jaroj. Sed la insulo urĝe bezonus profundajn reformojn, malpli da burokratio kaj pli rapidan malfermiĝon al moninvestoj. Anstataŭ tio oni devas timi novan stagnadon, kiu verŝajne definitive ruinigos tiun kompatindan landon, kiu ne volas liberiĝi de la komunismo kaj, el usona vidpunkto, meritis novajn sankciojn kaj bojkotojn. Al Kubo, kiu devas pagi ĉiujare du miliardojn da dolaroj por importitaj nutraĵoj, mankas la mono. La agrikulturo ne estas sufiĉe produktiva, malgraŭ iuj reformoj kaj kelkaj progresoj en la privata sektoro, en kiu laboras duonmiliono da homoj.

Internacia politika klimato malboniĝis por Kubo

La registaro en Havano jam delonge serĉas novajn sponsorojn, post kiam Venezuelo forfalis. Raúl eĉ veturis al Alĝerio por tie akiri nafton, kiun Venezuelo ne plu povis liveri. Nun precipe la malnovaj aliancanoj Ĉinio kaj Rusio devas helpi plenumi la energiajn truojn de Kubo, sen kio la insulo verŝajne dronus en la maro. Unuafoje post la 1990aj jaroj Moskvo denove liveris nafton al Kubo, ĉar sen tio la kuba ekonomio kolapsus jam morgaŭ. La amplekso de rusaj varoj, kiuj estis eksportitaj al Kubo, kreskis

pasintjare je 81 procentoj. Krom tio, en 2014 Putin konsentis rezigni pri repago de kubaj ŝuldoj en alteco de 32 miliardoj da usonaj dolaroj. Ĉinio investis 36 milionojn da dolaroj en iujn kubajn agrikulturajn kaj teknologiajn projektojn kaj en 2017 sendis varojn kun la valoro de 1,8 miliardoj da dolaroj al Kubo. Tiel refortiĝis la ekonomiaj rilatoj kun Moskvo kaj Pekino, kio probable kondukos ankaŭ al pli granda politika proksimeco kun tiuj potencoj – je la granda ĉagreno de Vaŝingtono, kiu malvolonte vidas reaperi ilin antaŭ sia dompordo. Malgraŭ la bonaj rilatoj kun la rusoj kaj ĉinoj, la internacia politika vetero por Kubo intertempe malsereniĝis. La malamikeco de Trump rilate al Kubo havas fatalajn sekvojn, ĉar Castro povis utiligi ĝin kiel pretekston por haltigi la malŝatatajn reformojn. La iamaj maldekstraj registaroj en Brazilo, Argentino, Ekvadoro kaj Ĉilio estis forbalaitaj, kaj Ekvadoro resendis kubanojn, kiuj fuĝis al tiu lando, ĉar ŝajnas, ke oni ne deziras havi ilin tie.

La rilatoj de Kubo kun Eŭropa Unio prosperas malrapide, ĉar Bruselo volas vidi unue politikajn progresojn rilate la staton de la demokratio kaj homaj rajtoj. Ŝajnas, ke ankaŭ la nova prezidento fajfas pri tio.

Sed kiel longe tiuj karaj „mecenoj“, al kiuj apartenas ankaŭ Hispanio kaj Kanado, de kies bonvolo Kubo plene dependas, ankoraŭ pretos helpi al Kubo? Eterne ŝtopi financajn truojn kaj liveri senpa-gajn varojn al Kubo ne estas interesa komerco. Eble ankaŭ ilia pacienco kun Havano baldaŭ elĉerpiĝos. Verŝajne oni senpacience atendas la forpason de Raúl Castro kaj vidos, kio tiam okazos en Kubo. Sed la lando estas en tiel malbona stato, ke necesus miliardoj por rekonstrui kaj resanigi ĝin. Sed kiu volas investi tiom da mono al fora izolita insulo kun fiaskinta, senperspektiva sistemo el antaŭa epoko, kies glora tempo jam delonge pasis? La sola espero por Kubo estas la rezigno pri la dogmo de la socialisma planekonomio, kiu paralizas ĉion kaj ĉiun. Post tio novaj investoroj aŭtomate aperos.

Pli da reformoj kaj libereco estas postulataj

Unuavice, la kubanoj deziras pli da ekonomia libereco, dum politikaj liberecoj ŝajnas havi por ili duarangan gravecon. Eksterlandaj entreprenistoj, kiuj estas ŝokitaj, kiam ili alfrontas la rigidan burokracion en Kubo, deziras malpli da malhelpanta reguligado de la ekonomio, pli da memstareco en la komerco kaj turismo kaj pli fidindan juran sistemon. Multaj anoncitaj reformoj ne realiĝis kiel ekzemple la unuigo de la skurila duobla monsisistemo en Kubo, kiu ankaŭ kaŭzis dividon de la popolo laŭ du klasoj: posedantoj de mono, kiu iom valoras, kaj havantoj de mono, kiu neniam valoras. La ĉefaj eksterlandaj monfontoj daŭre estas la turistoj, la ekzilkubanoj en Miamio kaj la „luigitaj“ kubaj laborfortoj en Brazilo, Kolombio kaj Bolivio. Sed la mono de tiuj fontoj neniel sufiĉas por konduki la landon el ĝiaj eternaj ekonomiaj krizo kaj stagnado. Ankaŭ la kleriga kaj sansistemoj, la iamaj lumturoj de Kubo, estas praktike difektitaj, kvankam ili iam estis modelaj en Latinameriko, kaj apartenas al la forvelkantaj mitoj kaj legendoj de la kuba revolucio, same kiel José Martí, Che Guevara kaj Fidel Castro. Kvankam Raúl Castro ne restis pasiva por akiri novajn monfontojn, akcelante la turisman infrastrukturon kaj donante impostajn privilegiojn al eksterlandaj entreprenistoj, la privata sektoro de la simplaj kubanoj stagnas de jaroj kaj reprezentas malpli ol dek procentoj de la kubaj laborfortoj. Malgraŭ iuj liberaligoj, la Castro-j rigide tenis la kontrolon pri la tuta ekonomio kaj bremsis la reformojn. Tiuj fifamaj ideologie obstinaj kanajloj, kiuj sukcese evitis esti akuzitaj antaŭ nacia aŭ internacia tribunalo pro sistema kaj grandstila lezado de la homaj rajtoj, simple trompis la kuban popolon, kiu havis grandajn esperojn kaj nun estas devigata elturniĝi laŭ kontraŭleĝaj metodoj por ekzisti. Pro timo perdi sian socialismon la komunistoj faris nenion por rompi la diablon cirkon; ŝajnas, ke ili fartis komforte kun la senrespondeca sinteno „post ni la diluvo“ aŭ en la kredo, ke la socialismo en Kubo neniam mortos. Cetere, la progreso de la reformoj dependas de la politika tendaro, kiu aktuale diktas la tonon en la kuba politiko: foje estas la reformemuloj, foje la bremsantoj, kiuj ĉikanas la privatan sektoron per diversaj malhelpaj leĝoj kaj reguloj. Tria alternativa forto kiel la opoziciuloj ne ekzistas en la kuba politiko. Evidentiĝis, ke la kubaj komunistoj fakte ne deziras privatan ekonomion nek demokration, jen la ĉefa problemo. La nigra merkato, falsado de bilancoj, trompado de leĝoj kaj reguloj kaj grandstila korupto prosperegas. En tiu marĉo de la ekonomia kaoso kelkaj ruzaj komercistoj eluzis la okazon por fabele riĉiĝi, dum la amaso de la popolo, kiu devas pagi altajn impostojn por ĉiu laborpaŝo kaj ago, esence malriĉiĝis kaj mizeriĝis. Cetere, tia scenaro ne estas antaŭvidita en la socialismo, sed en Kubo ĝi estas brutala realeco.

Multaj junaj kubanoj perdis la paciencon kaj amase forlasas la insulon, kies perspektivoj estas pesimisme pritaksataj kiel sinistraj. Inter oktobro 2015 kaj julio 2016 pli ol 46'000 kubanoj forveturs al

Usono. Elvojaĝi el Kubo ne plu estas malfacile. Sufiĉas montri la vizon por eniri alian landon kaj la monon por la aviadila bileto. La fiaskintan tropikan socialisman paradizon multaj adiaŭas por ĉiam. Ĉu tiu amasa elmigrado de la juna generacio signifas la definitivan mortbaton por Kubo, kiu ja bezonus ĝin, estas serioza demando.

Malfacilaj homaj rajtoj

Senkonsidere al la ekstera malfermiĝo de Kubo, la rajtoj je libera esprimado de opinioj, la libereco de kunvenado kaj cirkulado de homoj estis daŭre limigitaj ankaŭ en la pasinta jaro, kiel Amnestio Internacia skribis en sia plej freŝa raporto. Civilsociaj organizaĵoj kaj opoziciaj grupoj, kiuj aktivas surloke, raportis pri rekreskanta nombro de politike motivataj arestoj kaj ĉikanoj kontraŭ kritikantoj de la registaro. Havano ne ratifis la Internacian Pakton pri civitanaj kaj politikaj rajtoj nek la Internacian Pakton pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kvankam ambaŭ traktatoj estis subskribitaj en 2008. Same neratifita restis la Roma Statuto de la Internacia Punkortumo, kaj la kuba registaro ankaŭ ne agnoskas la respondecon de la UN-komitato kontraŭ turmentado kaj de la UN-komitato pri la malaperigo de homoj kaj ekzamenado de individuaj plendoj. Malgraŭ la pliboniĝo de la diplomaciaj rilatoj kun Usono, la havana reĝimo daŭrigis sian retorikon de la Malvarma Milito, misfamigis malplaĉajn politikajn aktivulojn kaj defendantojn de la homaj rajtoj kiel „kontraŭ-kubajn soldulojn“ kaj „kontraŭ-revoluciajn“ subterajn agantojn, ktp. La kuba justico restis sub la politika kontrolo. Homoj povis esti persekutataj, esplorataj, akuzataj kaj juĝataj laŭ leĝoj, laŭ kiuj agoj kiel „perturbado de la publika ordo“, „malrespektado“, „danĝereco“ aŭ „agresemo“ povis esti punitaj. La sekreta polico rigore persekutis kaj pridemandadis tiajn „malrespektajn“ aŭ „danĝerajn“ elementojn, arestis „Blankajn damojn“ kaj krude enmiksiĝis en la privatan vivon de la civitanoj sen ajna respektado de ilia intima sfero. En 2016 estis registritaj averaĝe po 862 arbitraj arestadoj por monato, kvankam samtempe la longdaŭraj malliberigoj iom malpliigis. Juraj procezoj estas sovaĝaj kaj maljustaj. Observantoj de homrajtaj asocioj ne povis inspekti prizonojn, en kiuj ekzistas mizeraj kondiĉoj por la kaptitoj, kaj entute ne ricevis permeson viziti la landon. Cenzurante la interreton, la registaro blokis aŭ filtris certajn interretpaĝojn kaj limigis la aliron al liberaj informfontoj. Sole kvarono de la popolo havis aliron al la interreto, dum nuraj 5 procentoj disponis pri konekto en sia loĝejo. Publike, la interreto estas uzebla nur sur certaj punktoj de Havano kaj iuj aliaj urboj, plej ofte en iu parko kun WLAN-konekto. En aŭgusto 2016 en la tuta lando ekzistis 178 tiaj publikaj punktoj, kie la interreto funkciis, tamen kun oftaj perturboj kaj interrompoj.

Laŭ la *Indekso pri demokratio* de la gazeto *Economist*, Kubo situis en 2017 sur la malbona 131a de 167 rangoj (127 en 2014). Laŭ la *Indekso pri percepto de korupto de Transparency International*, Kubo okupas la 62an (63an en 2014) lokon. Laŭ la *Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House*, Kubo okupas la 173an de 180 rangoj, kaj *Reporteroj sen limoj* konfirmis en 2018 la malbonan 172a pozicion de Kubo inter entute 180 rangoj. Do, neniu el tiuj centraj indikiloj montras pliboniĝon de la situacio en Kubo. Male, eĉ la inverso okazis pasintjare. Mirinde estas tamen, ke laŭ la *Indekso de la malneta enlanda produkto* Kubo situis en 2016, laŭ la kalkulo de Unuiĝintaj Nacioj, sur la kompare bona 65a loko inter 211 landoj, kun 89'689 dolaroj, kvankam en la listo de la Internacia Monfonduso kaj de la Monda Banko de 2017 la lando ial jam ne plu aperis.

Malgraŭ politika subpremado, ŝajnas, ke la kubanoj tamen emancipiĝis plej malfrue post la tempo, kiam la brita rokgrupo Rolling Stones, la romkatolika papo kaj la usona prezidento Obama vizitis la insulon, kun amikaj intencoj. Tiuj okazaĵoj estis vera printempo por la lando, kiu ankoraŭ iom daŭras, malgraŭ nova bremsado de la reforma dinamiko. Sed la ege konservativaj Castro-fratoj ne emis tro eluzi tiun printempon por turni la situacion al pli bona estonto kaj preferis renversi la procezon.

Malbonaj kondiĉoj por vivi kaj labori

Ne nur plej diversaj abstraktaj statistikaj ciferoj respegulas la malbonan situacion de Kubo. Ankaŭ ne temas pri okcidenta propagando, fantazioj de iuj sensasciemaj ĵurnalistoj aŭ arbitraj akuzoj de eksterlandaj politikistoj. Ajna iom klarvida kaj honesta kubano, kiu ne timas esprimi sian opinion, konfirmas la ĝeneralan mizeron de sia lando en intervjuoj, kiujn eksterlandaj ĵurnalistoj faras kun ili. Multaj perdis la timon rakonti al reprezentantoj de la eksterlanda gazetaro. Ekzemple L., bela 26-jara kubanino, diris al germana ĵurnalista, ke ŝi forlasos la landon, kiel ĉiuj ŝiaj amikoj antaŭ ŝi, se post unu

jaro da regado sub la nova prezidento pliboniĝoj ne estos videblaj. La virino tamen ne kuraĝas esprimi kritikon publike, ĉar ŝi timas esti arestita. L. laboras en iu ŝtata eldonejo, kie ŝia salajro estas 25 dolaroj – monate. Sed en alia laborloko ŝi gajnas la dekoblon. Post la fino de ŝiaj studoj pri lingvistiko la ŝtato volis, ke ŝi laboru en la cenzuroficejo. Kiam ŝi rifuzis tiun proponon, oni minacis ŝin per nuligo de la diplomo. La laboron en la eldonejo ŝi trovas ege teda, ĉar tie oni produktas ĉiam la saman politikan literaturon. Ĉiujn eĉ nur etajn kritikajn aludojn en iu filmo aŭ libro kontraŭ iu protagonisto de la kuba revolucio oni kutimas tuj sankcii per sufoko kaj elsarko. L. trovas tiun sintenon mediokra. Neniu de ŝiaj konatoj laboras por la ŝtato; kuracistoj veturas taksion, instruistoj (salajro: 20 eŭroj) laboras en la turismo, arkitektoj desegnas tatuojn. La akademiuloj vidas sian estontecon en simpla laboro. L. konfesis, ke ankaŭ ŝi iam adoregis Fidel Castro, ĝis kiam ŝi rimarkis, ke la tuta kulto ĉirkaŭ lia persono kiel heroo estas totala stultaĵo. Hodiaŭ neniu plu de ŝia generacio kredas je la socialisma revolucio. Ĉiu rigardas nur por si mem.

La opinion de L. reprezentas ne nur ŝi mem. La germana ĵurnalisto aŭdis ĝin ankaŭ en aliaj interparoloj kun junaj kubanoj, kaj en la ĉefurbo kaj en la provinco. Kiu povas forlasi Kubon, faras tion, kiu ne povas forlasi ĝin, tiu serĉas iun niĉon por si mem, kaj kelkaj homoj eĉ provas kontraŭstari la reĝimon.

Alia kubano, kiun la germana ĵurnalisto renkontis, rakontis al li eĉ pli absurdajn aferojn pri sia vivo. J., 29-jara, filo de komunisto, studis grafikan desegnadon kaj liveris al la lernejoj plej altnivelajn verkojn. Sed ial liaj profesoroj rifuzis ilin kaj ĉikanis la aŭtoron, kvankam la direktoro de la lernejo estas amiko de lia patro. Post la studfino J. intencis malfermi studion por grafika desegnado. La ŝtato rifuzis doni la permeson. Do, anstataŭ tio, li volis malfermi kafejon kun bakejo. La ŝtato ree rifuzis doni la permeson: aŭ estu kafejo aŭ nur bakejo. Post tiaj kafkaeskaĵoj spertoj li decidis fariĝi kuiristo por fari la matenmanĝon al turistoj. Por resti kreiva, li serĉas diversajn ingrediencojn en ĝardenoj kaj merkatoj kaj bakas banon per nuksoj kaj oreganplanto. Almenaŭ lia salajro estas multoble pli alta ol tiu de ŝtata oficisto. Ironie li aldonis, ke li gajnis en du jaroj pli multe da mono ol lia patro, kiu laboris en la propaganda aparato dum sia tuta vivo. En la rilatoj inter la filo kaj la patro ekzistas fortaj tensioj, ĉar la filo riproĉas al sia patro, kiu ĝuas kelkajn privilegiojn kiel ofican aŭton kaj aliron al la interreto kaj al malmultekostaj alkoholaĵoj, ke li rifuzas vidi la mizeron de la kuba popolo.

En Kubo ekzistas du sferoj de vivo: La privata inter samideaj amikoj, kie oni povas diri, lamenti kaj protesti kiel oni volas, kaj la publika vivo, kie oni prefere silentu. Ĉar unu el liaj amikoj laŭte protestis, J. ricevis la viziton de la ŝtata sekureco, kiu pridemandis lin pri plej diversaj privataj aferoj, ekzemple pri lia amikino, minace fanfaronante, ke „ni scias ĉion pri vi!“ Se oni ne respektas la minacojn de la aŭtoritatoj, oni povas riski, ke ili povas en ajna momento fermi vian budon.

A.J., 29-jara ĵurnalisto, estas eĉ pli kuraĝa ol J. Li serĉas rekte la konfrontiĝon kun la reĝimo. A. eldonas propran subteran retreŭon por skribi la veron pri Kubo. Kion la partia gazeto *Granma* ne skribas, do aperas en lia gazeto, kiu portas la titolon *Tornado* [en Esperanto]. Libera gazetaro ne ekzistas en Kubo – ekzistas nur la partia organo *Granma*, kiu diktas la oficialan politikan opinion. La kaŝa redaktejo de A. situas en iu publika kafejo. Sed kiun sencon havas retgazeto, se al la popolo mankas aliro al la interreto? A., kiu supozas sin observata kaj subaŭskultata de la sekreta polico, ne rajtas forlasi Kubon ĝis 2021, do li sentas sin politika malliberulo. Li rakontis al la germana ĵurnalisto, ke liaj gepatroj, kiuj servas en la armeo por defendi la politikan sistemon, perfidis sian filon, post kiam la sekreta servo vizitis kaj minacis ilin. Laŭ A., la reĝimo fiaskis. Se sesdek jaroj ne sufiĉis por iu revolucio, oni devus forgesi ĝin. Kvankam li konfesas, ke la kuba popolo estas sufiĉe klera, la politika reĝimo fariĝas pli kaj pli korupta. Ekzemple instruistoj donas bonajn notojn nur kontraŭ pago. La hospitaloj estas malpuraj kaj oni devas mem kunporti la necesan medicinon. Fakte, la sekreta polico finfine aperis ankaŭ ĉe A. persone por pridemandadi lin dum naŭ horoj. Ili forprenis liajn komputilon kaj moveblan telefonon, blokis lian interretaliron kaj volis ekscii, ĉu eksterlando financas lian gazeton. Por ĉantaĝi lin, ili malkaŝis siajn konojn pri liaj amikinoj kaj amatoj, kio ŝajne estas kutima taktiko. A. lamentis, ke li perdis ĉion: la familion, kiu estas absorbata de la diktaturo, la amikojn, kiuj laboras laŭ propra kalkulo, la amikinojn, kiu forveturis al Meksiko. Malgraŭ tio li sentas kuraĝon daŭrigi la retgazeton por skribi la veron pri Kubo. Li ne ekskludas la eblon, ke la reĝimo povus malaperigi lin en la kamparo. Neniu rimarkus tion kaj lia familio ne povus helpi kaj ne helpus al li.

Kiel ĉiuj aliaj kubanoj, ankaŭ la renkontita kamparano A.O. el C. plendis pri la malbona situacio en Kubo. Malgraŭ tio li neis la eblon de ribelo aŭ revolucio en Kubo. Neniu plu emas servi al la ŝtato. Ĉiuj retiriĝis al la privateco kaj reinventas sin mem kiel kubanon. En lia fabriko la laboristoj kutimas private vendi produktojn por povi ekzisti. A. konkludis laŭ jena simpla logiko: „Se neniu plu servas al tiu reĝimo, ĝi baldaŭ ne plu ekzistos.“

Sed antaŭ ol pere, la nacia parlamento dume kunsidos denove en la Kapitolo, kiu estis inaŭgurita en 1929 kaj post ampleksa renovigo denove servos al la kuba reĝimo ekde tiu ĉi jaro.

Andreas Künzli, junio 2018

Uzitaj fontoj:

<http://www.sueddeutsche.de/politik/kuba-parlamentswahl-leitet-das-ende-der-aera-castro-ein-1.3902155>

<http://www.handelsblatt.com/politik/international/ende-der-castro-aera-kubas-neuer-staatschef-daz-canel-ist-eine-marionette/21199674.html?ticket=ST-73531-JHcINnp7hccWET6XWxAy-ap5>

<http://www.handelsblatt.com/politik/international/miguel-daz-canel-selbst-auf-kuba-kennt-kaum-jemand-den-designierten-castro-nachfolger/21182394.html>

<https://bazonline.ch/ausland/amerika/castrodaemmerung/story/29905240>

<https://www.tagesanzeiger.ch/ausland/amerika/Die-Aera-Castro-geht-zu-Ende/story/15540052>

<https://www.amnesty.de/jahresbericht/2017/kuba>

<https://www.humanrights.ch/de/service/laenderinfos/kuba>

<https://de.wikipedia.org/wiki/Demokratieindex>

<https://de.wikipedia.org/wiki/Korruptionswahrnehmungsindex>

<https://www.reporter-ohne-grenzen.de/rangliste/2018>

<https://www.jungewelt.de/artikel/330960.stabwechsel-in-havanna.html>

<https://www.dasmagazin.ch/2018/05/25/kuba-kafkaesk/?reduced=true>

Antaŭaj artikoloj pri Kubo:

Kubo okaze de la morto de Fidel Castro:

http://www.planlingvoj.ch/Castro_biografio2016.pdf

10 jarojn de „Raŭlismo“ en Kubo:

http://www.planlingvoj.ch/Kubo_2016.pdf

Homaj rajtoj en Kubo:

http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf

Politika raporto Kubo 2010:

http://www.planlingvoj.ch/KUBO_Politika_raporto_2010.pdf

La unua artikolo de la sama aŭtoro pri Kubo aperis en MONATO en 1990 aŭ 1991.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, junio 2018

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Vizitis Kubon en 1990. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).